

V-19479/42 (1973)

dat.

Bulgara

ESPERANTISTO



E N H A V O

Nikola Aleksiev. Sukcesoj de la bulgaraj esperantistoj en 1972	1
Ĥristo Botev. Ĥaĝi Dimitro. Tradukis: Ivan Dobrev	3
Nikola Aleksiev. Laŭ la sanktaj paŝoj de la genia poeto-revoluciulo	3
Nedelĉo Ganĉovski. 60-jariĝo de tiu, kiu restis 29-jara	6
Kovo, Ĵ. Zaprjanov, Ĥr. Manolov. Omaĝe al la frata jubileo	9
B. Kavalĝiev. Originala ekspozicio pere de Esperanto	9
Vasil Mitovski. La mondo soifas pri paco kaj feliĉa vivo	10
Natalia Raĉeva. E-rondo en Borovo	11
B. Kavalĝiev, R. Georgieva. Novaj E-kursoj	11
Antonia Spasova. Gaja ekskurso	11
Rajna Stanĉeva. Celebro de Zamenhof-naskiĝtago	11
K. V. „Informilo“	12
* * * Angla revuo pri ni	13
Jonas Dagys. El la Esperantaj leteroj	13
Albert Lienhardt. Pledo por Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla	14
Emma Moŝkovskaja. La zizelo, kiu volis simili al homo	16
* * * Tra la gazetaro	16
* * * Deziras korespondi	III

Sur la kovrilpaĝo:

Portreto de la granda bulgara poeto-revoluciulo
Ĥristo Botev (1848—1876)

Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205, Bukureŝti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



SUKCESOJ DE LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ EN 1972

La esperantistoj en Popola Respubliko Bulgario renkontas 1973-an jaron kun ĝojo kaj espero pri novaj sukcesoj, kiuj sendube havos signifon por la plua disvolvo de la esperantista movado en Bulgario kaj estos valora kontribuo en la atingoj de la internacia Esperanto-movado.

En nia agado ni ĉiam respektis ne nur la bazajn interesojn de la bulgara popolo, sed ankaŭ la batalon de la tuta progresema homaro por paco kaj amikeco inter la popoloj sendiference de ilia socia ordo.

Tial ne hazarde la bulgaraj esperantistoj firme defendas la proponon pri kunvoko de Eŭropa konferenco por sekureco kaj kunlaboro. Tia konferenco ludos grandan rolon en la paco ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta mondo.

La granda batalanto por paco kaj feliĉo de la popoloj Georgi Dimitrov havis pozitivan rilaton al la agado de la esperantistoj por firmigo de la amikeco inter la popoloj. En 1972 en la tuta mondo oni celebris la 90-an datrevenon de lia naskiĝo kaj oni rememoris liajn testamentojn. La bulgaraj esperantistoj aktive partoprenis la rememorigon de tiu glora datreveno. La presorgano de UEA, la revuo „Esperanto“, publikigis tiukaze artikolon de la prezidanto de BEA kun portreto de Georgi Dimitrov. La Esperanta Redakcio de Varsovio organizis, laŭ Esperantaj materialoj el Bulgario, elsendon, dediĉitan al la vivo kaj la faro de G. Dimitrov kaj la atingoj de PR Bulgario, kiu sankte respektas la memoron kaj plenumas la testamentojn de sia granda filo. La revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Der Esperantist“, „Hungara Esperantisto“ k. a. publikigis specialajn materialojn pri Georgi Dimitrov. En Sofio la esperantistoj, kune kun la Kultur-informa Centro de la Germana Demokratia Respubliko, okazigis publikan kunvenon kun raporto de la esperantistino el Berlin Linde Knöschke je temo „Kiel en la Germana Demokratia Respubliko oni plenumas la testamentojn de Georgi Dimitrov“. En la naskiĝloko de Dimitrov — la vilaĝo Kovaĉevci, kiel ankaŭ en la urboj Plovdiv, Kazanlâk k. a. lokoj estis organizitaj regionaj esperantistaj renkontiĝoj kun la partopreno de la konata Esperanto-redaktoro kaj poeto Asen Grigorov, kiu estis ankaŭ persona sekretario de Georgi Dimitrov.

En Leipzig estis organizita de germanaj kaj bulgaraj esperantistoj komuna celebrego de la datreveno de Georgi Dimitrov, en kiu parolis la malnova esperantisto-veterano Otto Bässler, kunlaboranto en la Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Leipzig.

Interesan ekspozicion oni organizis en urbo Polski Trâmbeŝ, Norda Bulgario, el materialoj, ricevitaj pere de Esperanto, je temo „La mondo batalas por paco kaj progreso“. En la ekspozicio estis ankaŭ speciala fako

pri G. Dimitrov. Ĝi ĝuis grandan sukceson en la urbo kaj en la najbaraj vilaĝoj.

La ĉefurba studenta esperantista societo „Vela Peeva“ kaj la gelernantaj esperantistaj societoj kaj grupoj en la urboj Vraca, Karlovo, Dospat k. a. organizis oratorajn konkursojn, viktorkonkursojn k. s. je temo „Kion vi scias pri Georgi Dimitrov“. La distingigintoj en la konkursoj estis premiitaj.

En urbo Karlovo laboris unu monaton internacia junula esperantista brigado, kiu dediĉis sian laboron al la sankta memoro pri Georgi Dimitrov.

La Bulgara Esperantista Kooperativo eldonis por disvastigo la portreton de Georgi Dimitrov kun mallonga teksto en Esperanto.

Okaze de la datreveno de la Granda Oktobra Socialista Revolucio kaj la 50-a datreveno de la jubileo de Sovetunio estis organizitaj de la esperantistaj societoj specialaj kunvenoj (Sofio kaj Karlovo), en Flaskovo — distrikta renkontiĝo, en Ŝumen — regiona renkontiĝo de la esperantistoj de Nord-Orienta Bulgario, en Plovdiv — tutlanda E-renkontiĝo k. a.

La bulgaraj esperantistoj aktive partoprenis la batalon de la popoloj por ĉesigo de la usona agreso en Vjetnamio. La reprezentantoj de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, la poetoj Kha kaj Trung, parolis en amasaj kunvenoj en pluraj urboj de nia lando. Estis organizitaj specialaj montrofenestroj kun fotomaterialoj, ricevitaĵoj el Vjetnamio, senmaskigantaj la usonan barbarecon.

La prezidantino de la Bulgara Esperantista Junularo Bojka Batalska, sekretario de CK de BEA, partoprenis la delegitaron de TEJO en la internacia junula konferenco en Helsinko por akcelo de la kunvoko de Eŭropa konferenco por sekureco kaj kunlaborado.

Kune kun la Kulturcentro de la Hungara Popola Respubliko en Sofio estis organizita solena esperantista kunveno okaze de la nacia festo de Hungario kun oratoroj de la Hungara E-Asocio kaj la dramaktoro el Budapeŝto Lila Mikeŝ.

En la kvina internacia Esperanto-festivalo de la pup teatroj en Zagreb la Esperanta spektaklo de la bulgara pup teatro de urbo Burgas ricevis duan premion. La teatro estis invitita al turneo en Danlando.

Estas ankoraŭ multaj menciindaj sukcesoj, sed sendebla plej granda kontento en la Esperanta vivo en Bulgario dum 1972 j. estas la 38-a Landa Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis 1098 bulgaraj kongresanoj kaj dek eksterlandaj delegitaroj.

La okazinta aŭtune Plenkunsido de la CK de BEA akceptis vastan programon de praktikaj entreprenoj por garantii la plenumon de la kongresaj decidoj. Tio pozitive influos al la plua disvolvado de la Esperanto-movado en nia lando, por ĝojo ankaŭ de niaj Esperantaj geamikoj en fremdlando.

En la Nova 1973-a Jaro ni sautu nin pro ankoraŭ pli grandaj sukcesoj!

Mi kredas je la unueca komunista forto de la homa gento sur la terglobo fari bonon.

Kaj je la unueca komunisma sociordo, savanto de tiuj popoloj kontraŭ multjarcentaj suferoj kaj turmentoj per frata laboro, libereco kaj egaleco.

KRISTO BOTEV



Okaze de la 125-a naskiĝ- tago de Ĥristo Botev

HAĜI DIMITRO¹
de Ĥristo Botev

Vivas li, vivas! . . . Sur la Balkano
en sang' dronanta kuŝas kaj ĝemas
vundita bruste juna bandano —
profunda vundo la korpon premas.

Pafilo ŝtala tie vidiĝas,
rompita sabro flanke . . . li svenas . . .
krepuska vido, kapo skuĝas,
la tutan mondon buŝo malbenas.

Li kuŝas . . . Kaj elsupre sen fino
suno haltinte brilas kolere,
kampare kantas rikoltantino
kaj sango pli elfluas libere.

Rikolto estas. . . Kantu, sklavinoj,
lamentajn kantojn! Suno, briladu!
En sklava land' pereos finfine
bravu! . . . Sed, koro mia, ne batu!

Ja kiu falas por la libero
mortas neniam! Pro li ekploras
naturo, besto, nubo kaj tero,
kaj bardoj mira-kante lin gloras . . .

Lin superombras aglo fieras,
la vundon lekas lupo-kunfrato,
falko fortika — birdo libera —
apude ankaŭ zorgas pri frato.

Vespero venas, luno ekbrilas,
surŝutas steloj foron ĉielan;
arbar' susuras, vento sopiras,
Balkano kantas kanton ribelan.

Feinoj en blankaĵo irflue
komencas kanton — jen proksimiĝas,
surpaŝas verdan herbon senbrue
kaj al vundito venas, sidiĝas.

Jen unu lin karesas facile,
sur vundon dua herbojn surmetas,
je lipoj tria kisas subtile . . .
li ŝin rigardas — ŝi nur ridetas.

„La finon, franjo, diru sen timo
de Karaĝa² kaj bando fidela,
ho diru, poste prenu l'animon,
mi volas morti tie ĉi, bela!“

Feinoj aŭdas lian deziron,
ĉielon ili flugas kantante,
flugadas en la vastan efiron,
de Karaĝa' spiriton serĉante

Sed mateniĝas! Sur la Balkano
profundan vundon lupo eklekas,
en sang' dronanta kuŝas bandano,
kaj suno ree brilas, brilegas!

El bulgara: Ivan Dobrev

^{1, 2} Haĝi Dimitro kaj Stefan Karaĝa — nomoj de famaj bulgaraj vojevodoj-amikoj. En 1868 j. ili ekstaris frunte de taĉmento el 130 ribelantoj, formita en Rumanio, transiris Danubon kaj komencis batalojn kontraŭ la kvincentjaraj konkerintoj de Bulgario. En batalo St. Karaĝa estis kaptita kaj poste pendumita de la turkoj, kaj Ĥ. Dimitro atingis la Balkanon. Tie li falis en batalo sur montopinto Buzluĝa.

LAŬ LA SANKTAJ PAŜOJ DE LA GENIA POETO-REVOLUCIULO

Ne ekzistas bulgaro, kiu jam en la infan-aĝo ne estus nutrata per amo al la plej ŝatata kaj plej granda bulgara poeto Ĥristo Botev, sanktiginta sian poezion per la varma sango de legenda revoluciulo.

Pri la periodo de lia migrado en najbara Rumanio ĉiu el ni scias sufiĉe multe. La nomoj de kelke da rumajn urbojn estas fiksitaj en la memoro de ĉiu bulgaro, ĉar tie pasis la ŝtorma revolucia agado kaj la fajra literatura verkado de la senmorta Botev.

Estis bonega iniciato de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj organizi specialan ekskurson por siaj membroj al la Botev-lokoj en frata Rumanio. Tie ĉi mi volas rakonti mallonge pri miaj pensoj kaj impresoj de tiu ekskluzive interesa ekskurso, entreprenita en la antaŭvespero de la 125-a datreveno de l'naskiĝo de nia poeto-titano.

La aŭtobuso de „Balkanturist“ nin prenis el la ĉefurbo en frua mateno de decembra tago. Laŭ la kalendaro ni devus atendi froston kaj neĝblovadojn,

sed nia vojaĝo komenciĝis kaj finiĝis en sennega vetero ĉe tolerebla temperaturo, kelkiam eĉ ni estis varmigataj de agrabla, kvankam malforta suno.

Ĉe la vesperiĝo ni transiris la „Ponton de l'Amikeco“ apud Ruse kaj troviĝis sur la transan bordon de Danubo en urbo Giurgiu. Tuj nia interpretistino komencis montri al ni domojn, stratojn kaj aliajn lokojn, ligitajn kun la agado de Ĥristo Botev en tiu rumana urbo. Ni trarigardis la havenon, kie estas metita memoriga tabulo kun teksto en bulgara kaj rumana lingvoj, por signi la enŝipiĝon de Botev kaj parto de liaj kunuloj en la aŭstra vaporsipo „Raddecki“, kiu estiĝis por la bulgaroj sanktaĵo kaj legendo.

Ni vizitis ankaŭ la urbojn Braila, Galac kaj Bukureŝto. Ni vidis ĉe kiaj primitivaj kondiĉoj de ĵurnalista laboro naskiĝis modela, fajroplena ĵurnalistiko, postlasinta neestingiĝantajn spurojn en la konscio de la bulgara popolo, en la historio de la bulgara naciliberiga movado. Tial ankaŭ nun ni treme emociiĝas antaŭ la temperamentaj linioj de la poeto ĵurnalisto, plenaj de kolerego aŭ de amo, kaj mirkonsterniĝas pro tio, kiel li povis, ankoraŭ tiom juna, penetri en tiel profundajn verojn, disvolvi tiel sian potencon poetan talenton ĉe verdire mortigaj materialaj kondiĉoj de vivo kaj kreada laboro. Nur giganto de penso kaj agado povas venki la ekskluzive grandajn vivobstaklojn kaj atingi tiajn kapturnajn pintojn de poeta kreado, kiuj emocias ne nur la bulgarajn korojn. Skribitaj antaŭ pli ol jarcento, liaj versaĵoj, artikoloj, felietonoj, pamfletoj vivas ankoraŭ hodiaŭ kaj mirigas kaj emocias eĉ fremdlandanojn, kiuj por la unua fojo kontaktiĝas kun la verkoj de Ĥristo Botev.

Kiam antaŭ du-tri jaroj aperis en Esperanto-traduko la libro „Elektita verkaro“ de Ĥristo Botev (ĉiuj liaj versaĵoj kaj parto de la felietonoj), la konata internacia Esperanto-revuo „Esperanto“, organo de Universala Espe-

ranto-Asocio, publikigis pri ĝi recenzon. La aŭtoro de la recenzo pravedonis altegan pritakson al la Botev-verkaro kaj emfazis, ke ankoraŭ hodiaŭ — cent jarojn post la apero de tiuj verkoj — ili estas legataj kun intereso.

Kune kun la konataj vjetnamaj Esperanto-poetoj Dao Anh Kha kaj Nguyen Hai Trung la pasintan someron ni vizitis la muzeo-domon de Ĥristo Botev en Kalofer. La vjetnamaj amikoj estis jam legintaj en Esperanto liajn elektitajn versojn. La kontakto kun tiom multe da aferoj atestantaj pri la grandeco de la revoluciulo kaj poeto Botev, kvazaŭ ilin sorĉis. Kiam ni ekiris, dum la tuta veturado k-do Trung skribis ion en sia notbloko. Evidentiĝis, ke li verkis poemon pri Botev, por esprimi la sentojn travivitajn de li ĉe li vizito de lia naskiĝdomo (vidu „BE“ n-ro 7—8/1972).

Mi foje aŭdis el la buŝoj de kleraj alilandanoj, ke eĉ laŭ la alta kriterio de l'eŭropa literaturo kaj ĵurnalistiko Ĥristo Botev staras sur la nivelo de la plej indaj poetoj kaj ĵurnalistoj de sia tempo, postlasintaj al la generacioj valoran heredaĵon. La konata soveta ĵurnalisto David Zaslavskij skribas en la antaŭparolo de la libro „Ĥristo Botev — Publicistiko“: „La lingvaĵo kaj la stilo de Botev lin metas en la unuajn vicojn de la mondkonataj publicistoj. Se ni serĉus komparojn kaj fontojn, ni devus unue mencii pri Hercen.“

Kaj vere, kiom da ĵurnalistoj ne en malgranda, sklavigita Bulgario, sed en tuta Eŭropo dum la tempo de la granda Pariza Komunumo skribis pri la komunumanoj ion ajn pli grandan laŭ formo kaj enhavo ol „Ridinda ploro“ de Botev?

Kio donas tian vitalecon kaj forton al la Botev-verkaro?

Antaŭ ĉio lia grandega poeta talento, kombinita kun la forte esprimita revoluci-demokratia ideologio de la poeto, kiu per sia senlaca soci-politika kaj ĵurnalista aktiveco donis karnon kaj san-



gon al sia poezia-publicista kreado, kunfandis poezion kun vivo, fordonis sin ofere „antaŭ la altaro de la patrujo“, kiel li skribis pri siaj kamaradoj, pereintaj en la kruela batalo por nacia liberiĝo de Bulgario el kvincentjara fremda jugo.

Hodiaŭ la homaro troviĝas en ĝis nun senprecedenca movado kaj batalo por plena nacia libereco kaj socia kaj ekonomia sendependeco, por starigo de „racia kaj frata unuiĝo de la popoloj“, kiu neniigos „la turmentojn, la mizeron kaj la parazitojn de la homa gento“ kaj starigos „veran liberecon, fratecon, egalecon kaj feliĉon sur la terglobo“ (ĉio citita estas de Botev). Kiel povus ne soni nuntempe la verkaro de Botev, se centoj da milionoj da homoj sur la tuta tero batalas por la triumfo de tiuj noblaj idealoj?

Jen kial ĉiuj laboremaj homoj, ĉiuj honestaj patriotoj, ĉiuj konsekvencaj internaciistoj, ĉiuj revoluciuloj kaj batalantoj por nacia kaj socia liberiĝo de la popoloj sentas proksimaj ĉe sia koro la forton kaj la raven de la poeto kaj revoluciulo Hristo Botev.

La dankoplena rumana popolo montris sian respekton al la revolucia internaciisto, kiu aktivis en ties gastamlando, apartigante en la Muzeo de urbo Braila specialan ejon, en kiu estas kolektitaj kaj ordigitaj interesaj eksponaĵoj, ligitaj kun la revolucia agado de nia fama samnaciono. Scienca laboristo de la Muzeo, bone konanta la biografio de Botev, donis al ni klarigojn pri la ekspoziciitaj, por ni sanktaj, relikvoj. Lia rakonto revivigis antaŭ niaj okuloj la atmosferon, en kiu laboris kaj vivis tiu aglo de la bulgara nacia revolucio. La fama gastejo, kiu prezentis ion similan al klubejo de la bulgara revolucia elmigrintaro en Braila, nun povas esti vidata nur kiel sukcesarit a modelo en la Muzeo. Nun sur fa loko de la iama gastejo troviĝas lova loĝbloko, sur kiu staras tabulonor memorigi pri tiu modesta kon-

struaĵo, intime ligita kun nia historio kaj redonita de la majstra plumo de Ivan Vazov — kuntempulo de Botev kaj patriarko de la bulgara literaturo. Lia emocia novelo „Senhejmuloj“ (Nemili-nedragi) estas, tiel same, tradukita en Esperanton, kaj ĝia dramigaĵo estas ĉiam ankoraŭ ludata sur la scenejoj de la bulgaraj teatroj.

La ĉefurbo de socialisma Rumanio — la belulo Bukureŝto — konservis presejon, loĝdomojn kaj aliajn lokojn, ligitajn kun gravaj momentoj el la agado de Botev. La lasta loĝejo de Botev troviĝis sur strato „Rumenoara“ 15 (hodiaŭ str. „Dimitrie Onĉul“ 23). De tie ĉi Botev direktiĝis al la plej malnova bukureŝta stacidomo Filaret la 13-an de majo 1876, forlasante sian edzinon Veneta, la filinon Ivanka (aĝan nur 40 tagojn), patrinon kaj la malpli aĝajn fratojn, sen diri kien li iras. Li forveturis al Giurgiu kaj kune kun parto de siaj ribeluloj (sub la formo de legomkulturistoj) eniris la aŭstran vaporsipon „Radecki“, transiris al la sklavigita teritorio kaj post kelktagaj kruelaj bataloj kontraŭ pli multnombra malamiko pereis heroe de la kugloj de l'arnitaj trupoj de la Otomana Imperio.

Mi pensas, kiel bone estus, se tiu ĉi domo iun tagon fariĝus muzeo, bonega loko por internaciisma edukado de bulgaroj kaj rumanoj! Ja ili brave batalis kontraŭ fremdaj kaj siaj propraj sklavigantoj kaj metis granitan fundamenton de sia amikeco, tiom necesa ankaŭ hodiaŭ, en la epoko de grandioza socialisma reformado de la du najbaraj ŝtatoj!

Kiel bona ilustraĵo de la bulgara-rumana amikeco, naskita en tiuj malproksimaj tempoj, kiam Botev agadis en la urboj de Rumanio, estis ankaŭ mia renkontiĝo kun unu el la plej aktivaj pioniroj de la rumana Esperantomovado. En Bukureŝto iun vesperon mi konversaciis pri aktualaj Esperantaj problemoj kun la prezidanto de la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato,

k-do Jozefo Petrin, mia kaj de la bulgaraj esperantistoj malnova kora amiko. La sekvan tagon mi renkontiĝis kun ankoraŭ tri veteranoj, nelacigeblaj agantoj por la progreso de l'Esperanto-movado en Rumanio: Konstantin Sîrbu, Saul Osias kaj fervojinĝeniero Radu Patraşku.

En tiuj renkontiĝoj kaj interparoloj mi eksciis ĝojigajn faktojn pri la perspektivo de la Esperanto-movado en Rumanio. La Komitato de Kulturo decidis ankaŭ ĉi-jare sendi ŝtatan pup-teatron al la Sesa Internacia Esperanto-Festivalo en Zagrebo; tiucele ĝi sendos ofice ekster Bukureŝto k-don Petrin por instrui Esperanton al la aktoroj, kiuj partoprenos la spektaklon. En la tre populara rumana revuo de la Societo por Amikeco kun USSR („Argus“) aperis ar-

tikolo mallonga, sed tre favora al Esperanto. Funkcias kursoj de Esperanto en la Universitato en urbo Kraiova, kiu eldonis por la kursanoj Esperanto-lernolibron de Petrin, funkcias kursoj ankaŭ en Braşov kaj aliaj lokoj. Vico de esperantistoj sin preparas partopreni la 58-an Universalan Kongreson de Esperanto en Beogrado. La malnova pioniro de MEM, k-do Simon Arpad, kvankam ĵus elirinta el hospitalo post operacio, ĉiam same vigle rilatas al la agado por altiri esperantistojn al aktiva porpaca batalo. Bedaŭrinde, pro la streĉita programo de nia specialigita ekskurso, mi ne disponis pli da tempo por renkontiĝi ankaŭ kun aliaj rumanaĵ esperantistoj tiel de la ĉefurbo, kiel en la urboj, kiujn ni vizitis.

NIKOLA ALEKSIEV



60-JARIĜO DE TIU, KIU RESTIS 29-JARA

Pleniĝis 60 jaroj de la naskiĝo de Nikola Ŝopov — elstara aganto de la sofia laboristaro. Kaj li mortis sur la pendumilo 29-jara. Ĝuste en la monato de sia naskiĝo, kelkajn tagojn post sia lasta naskiĝtago.

Kaj restis 29-jara.

Ni, la junaj kompare al li tiam, jam pasigis la 50 kaj estas survoje al la maljuneco. Li jam finis sian 60-jaran aĝon, sed restis 29-jara. Ĉu ni fariĝis pli saĝaj ol li, ĉar ni amasigis tiom multe da jaroj kaj lasis liajn 29 malantaŭ ni? Revenante pense al li, ĉiam mi vidas, ke lia saĝeco estas daŭra. Tio estas la eterna saĝeco de la batalo por pli feliĉa vivo kaj progreso kaj la kapablo subigi ĉion personan, sian vivon, la vivon de sia familio al la postuloj de tiu ĉi batalo. Al li apartenas la laŭ Botev-maniero inspiritaj vortoj, direk-

titaj al liaj infanoj tri tagojn antaŭ la pendumo: „Memoru, ke via paĉjo krom vin amis ankaŭ sian popolon kaj en la popolo li vidis vin.“ Li eldiris ankaŭ la flugantajn vortojn: „Mi mortas, por ke vi povu vivi...“ — vortoj, kiujn hodiaŭ konas ĉiu etulo kaj plenaĝulo, kaj kiuj fariĝis unu el la simboloj de tuta epoko, spegulante la sencon de ekzisto kaj pereco de miloj da homoj. La feliĉo de Nikola Ŝopov ne estis en iu kreskanta materiala bonfarto, kiun li ne havis kaj neniel penadis ekhavi, ja estis neeble ĝin havi eĉ se li dezirus. Liaj modestaj enspezoj de kvalifikita laboristo sufiĉis al li nur por vivteni sian familion. Kaj la alion, la mankantajn, anstataŭis lia spirite riĉa vivo de proleta revoluciulo, de aganto de la laborista kaj sindikata unuiĝo kaj eĉ de aganto



en la sfero de la lingva kulturo. Kaj ĉio ĉi parolas, ke lia materiala modesta vivo estis plena kaj riĉa. La bagatelema egoisma fermiĝo en si mem, senfrukta kaj senĝoja, estis fiziologie fremda al li. La sencon de la vivo li vidis en tio — disdoni sin, fordoni sin al la homoj, al la laborista klaso, al la komunismo. Jen — elektita kiel sekretario de la Laborista Esperanto-Asocio, li klopodas disvastigi Esperanton, kiun li opinias lingvo de interkompreniĝo kaj frateco de la popoloj; jen — sekretario de la profesia unuiĝo de l'konfitistoj, li klopodas defendi iliajn interesojn kontraŭ la maljustoj; jen — turisto kaj arda deklamanto, li, ĉiam en la koro de la laboristaj kompanioj, entuziasmigas siajn fratojn laŭ klaso en la batalo por socia progreso kaj pli feliĉa vivo. Malgraŭ ke li ne ricevis altan lernejan instruitecon (li sukcesis fini nur la 5-an klason¹ de gimnazio), dank' al memklerigo, miriga pro sia obstineco, kaj al la lernejo, kiun li pasigis en la Komsomolo² kaj la Komunista Partio, laŭ-

esence li fariĝis laborista inteligentulo; laŭ sia marksisma eruditeco, laŭ sia kulturo, laŭ sia scipovo paroli, rakonti, verki kaj ekregi lingvojn, li estis tipa reprezentanto de la laborista inteligentularo, kiu prezentis la spinon de la revoluciaj kadroj. Homo de nefleksebla volo, hardita por venki malfacilajn obstaklojn kaj subigi sentojn kaj emojn al la granda komuna afero, homo de alta ideeco kaj principeco kaj de arda internaciismo — tio estas Nikola Ŝopov. Praktike la internaciismo ĉe li estis lia preteco eniri la batalgrupon de Nikola Botuŝev³ kaj zorgi pri ĝia armigo, por ke ĝi povu en plej baldaŭa tempo ekagi kaj fariĝi parteto de la Ruĝa Armeo — milojn da kilometroj malproksime de ĝi, fizike for de ĝi, sed nedisigeble ligita kun ĝi en unu tuto, same kiel ĉiu vera komunisto estis kaj estas parto de la multmilionara armeo de la tutmonda proleta avangardo. La tasko de la batalgrupo estis neniigi la Hitler-voĉonarojn veturantajn al la Orienta Fronto kontraŭ la sovetaĵ popoloj. Tiu ĉi aktiva internaciismo estis en sanga unueco kun lia amo al lia popolo kaj patrolando. „Memoru, ke via paĉjo amis sian popolon kaj en la popolo vidis vin!“ — tiuj vortoj sonas kiel testamento. „Jen tagon vi ekscios, kial via paĉjo mortis“

Lia konduto antaŭ kaj dum la pereco estis konsekvenca fino de la vivo de tuteca persono. Karakteriza por Ŝopov estis la klara konscio pri la neevitebleco de la viktimoj. Se la bataloj jam komenciĝis, la batalantoj havas la

² *Komsomolo* — mallongigo de Komunista Junulara Asocio.

³ *Nikola Botuŝev* (1897—1941) — elstara bulgara revoluciulo kaj partia aganto. Post la invado de la Hitlerista armeo en Sovetunion li komencis organizi nelegalajn batalgrupojn en Sofio. Kaptita la 27-an de septembro 1941, li estis mortkondamnita de la faŝista tribunalo kaj pendumita.

¹ Laŭ la nuna instruisistemo en Bulgario tio estas la 9-a klaso.

devon eĉ en sia morto esti indaj kaj neŝanceblaj samkiel en sia batalo. Ĉion ĉi li pruvis de la komenco ĝis la fino — per ĉiu sia spiro, per sia tuta granda animo, per sia tenere-tragika amo al sia edzino-vivkamaradino, per sia kortuŝa patra amo al siaj du etaj infanoj, tiuj, de kiuj li postulis marŝi laŭ lia vojo kaj kiujn li portis ĉiam en sia varma koro; per sia amo al la vivo, per sia potenca vivinstinkto kaj — finfine — per sia kapablo morti digne.

La 5-an de novembro ni ne gratulis al li la naskiĝtagon, ĉar tiam en nia lando ankoraŭ ne ekzistis la tra-

diĉio noti la naskiĝtagojn. Sed li certe diris al si, ke tio estas lia lasta naskiĝtago, kaj ke ĝi koincidas kun la lastaj tagoj de lia vivo. Certe li skuetis la kapon triste pri tiu tragika situacio, la eliron el kiu difinos aliaj — la regantoj kaj la juĝistoj. Sed li devis trapasi tiun Kalvarion kun la stoikeco de proleta revoluciulo.

La naskiĝtago de Nikola Ŝopov ne malaperis pro lia fizika morto. Kune kun la memoro pri li, kune kun lia nomo kaj kun la popola danko ĝi restis vivanta, kaj lia naskiĝo estas kunigita kun lia pereco en senmortecon.

Nedelčo Gančovski

VERDA TABULO

ĈIAM SUR LA ESPERANTA POST ENO

Ankaŭ nun nia fervora s-ano Dimitr Ivanov el Plovdiv (sur la foto) donas ekzemplon de sindona laboro por Esperanto, por nia nobla E-movado.

Jam dum septembro li komencis perletere inviti al la klubejo de E-Societo „Kulturo“ la membrojn kaj aliajn konatajn al li esperantistojn por aboni E-gazetojn, pagi membrokotizojn ktp. Al kelkaj, kiuj longtempe ne venis, li denove sendis leterojn kaj insiste petis ilin plenumi sian E-devon.

Por „Bulgara Esperantisto“ li kolektis 135 abonojn kaj por aliaj E-revuoj — 34 abonojn.

Membrokotizon li kolektis de 117 samideanoj.

Brave, k-do Ivanov! Per realaj faroj vi esprimas vian amon al nia Esperanto-afero!



La Lernanta E-Societo „ANNE FRANK“ en la Teksa Teknikumo u. Vraca abonigis 100% siajn membrojn por „BE“ 1973 — do 160 abonoj.

La Lernanta E-Societo „JULIO BAGHY“ en la Teknikumo de Vestajo u. Vraca kolektis 45 abonojn de „BE“.

NIAJ DISTINGULOJ

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris nian fervoran samideanon DIMITR IVANOV el u. Plovdiv per ordeno „9 de Septembro 1944 j.“ — III-a grado okaze de lia 50-jariĝo kaj pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo.

La Ŝtata Soveto honoris ankaŭ nian Esperanto-aktivulon MANOL COLEV el u. Velingrad per „Popola ordeno de la laboro“ — I grado pro lia aktiva sociagado kaj speciale en la kampo de la turismo.



OMAGĖ AL LA FRATA JUBILEO

EN SOFIO

Je la 20 de decembro 1972 la sofiaj esperantistoj kolektiĝis por solene celebri la gloran 50-an jubileon de la Soveta Ŝtato.

Raporton pri la fondo de USSR kaj ĝiaj rimarkindaj ĉiufankaj sukcesoj faris k-do Jonko Nenkov. Li esprimis la profundan amon kaj estimon de la bulgaraj esperantistoj al la frata soveta popolo — nia duobla liberiginto — de otomana kaj faŝista jugoj, nia senprofitema fidela amiko kaj potenca protektanto, neŝancelebla apogo de la tutmonda paco.

Post la raporto estis plenumita belarta programo. La artistino de la Bulgara Esperanta Teatro Belka Beleva recitis la belegan „Odon pri USSR“ de Orlin Orlinov. La artisto Miŝo Zdravev plenumis „Versojn pri la soveta pasporto“, kaj Kunĉo Vălev recitis „Maldekstran marŝon“ de Vladimir Majakovski.

KOTO

EN ĤASKOVO

Dediĉe al la 50-jariĝo de Sovetunio la Distrikta E-Komitato en Ĥaskovo organizis ĉe la „Fonto de la Blankpiedulino“ renkontiĝon de la esperantistoj el la distrikto.

Dekoj da esperantistoj kliniĝis antaŭ la monumentoj de l'esperantistoj-kontraŭfaŝistoj Margarit Gogov kaj Kosta Angelov el u. Ĥarmanli, mortigitaj de la faŝista polico en 1935. Poste ili trarigardis la „Fonton de la Blankpiedulino“ kaj dividis sperton el sia organiza, kultur-amasa kaj porkursa laboro.

J. Zaprianov

(El j. „Ĥaskovska Tribuna“, 12. X. 72 j.)

LA REZULTOJ DE LA KONKURSO-VIKTORINO „KION VI SCIAS PRI UKRAINIO“

Lige kun la 50-jara jubileo de Sovetunio la Esperanto-Klubo de Ĥarkov anoncis konkurson-viktorinon (pri ĝi „Bulgara Esperantisto“ siatempe informis — n-ro 6, paĝo 12). La konkurson partoprenis multaj esperantistoj el Bulgario, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Litovio, Estonio, Rusio. Jen la rezultoj:

I-an premion oni ne aljuĝis;

II-an premion gajnis:

Ilija Kolev — bulgaro, instruisto (v. Novi Ĥan, distrikto de Sofio);

Bronius Riŝka — estono (Ŝateikiai);

III-an premion gajnis:

Fred Neeme — estono (Kehra Kooli);

Sofia Lutrova — bulgarino (Ruse);

Poljakova Nataŝa — rusino (Omsk).

EN POLSKI TRÂMBEȘ

La Internacia Lingvo tagon post tago firmigas sin en la kultura kaj politika vivo de nia urbo Polski Trâmbeș. Okaze de la 50-jara jubileo de la multnacia soveta ŝtato oni aranĝis urban kunvenon kaj ekspozicion. Laŭ la plano de la amasaj organizaĵoj la E-Societo „Espero“ devis trovi la necesajn materialojn por la ekspozicio rekte el Sovetunio. La tasko estis plenumita en rekorde mallonga tempolimo. Centoj da albumoj, afiŝoj, diagramoj, libroj k. a. venis el ĉiuj partoj de la granda soveta lando. La sovetaĵ esperantistoj ankoraŭ foje montris sian solidarecon kaj helpis nian gravan iniciativon. Specialan dankon meritas la instruista kolektivo kaj k-do A. Kubulnieks en la lernejo de Ziemeri, Latvio, s-anino Cemberova kaj la Leningrada Porpaca Komitato, la societoj por kulturaj rilatoj kun alilando en Moskvo kaj Riga, la E-klubo en Omsk kaj m. a. La loka gazeto „Znamja“ en urbo Uzlovaja, dank' al k-do L. Fiŝbejn, aperigis artikolon pri nia agado.

La venintaj materialoj estis tiel multaj, ke sufiĉis ĉe por tri ekspozicioj. Tion substrekis ankaŭ la oficialaj gastoj el la distrikta centro Veliko Târnovo, kiuj montris la ekzemplon de la esperantistoj kiel imitindan.

Ankoraŭ foje koran dankon, sovetaĵ geamikoj!

Hristo Manolov

ORGANIZA VIVO

ORIGINALA EKSPOZICIO PERE DE ESPERANTO

Nia s-anino Ksenija Kafegieva, longjara fervora membro de E-Societo „Libero“, kolektadis hobiaĵojn de siaj eksterlandaj korespondamiko reprodukciojn de bildoj de famaj pentristoj el la tuta mondo.

Ŝi aranĝis bonegan publikan ekspozicion en la salono de Centra Legejo „Zora“, ordigita laŭ epokoj kaj nacioj. Ne mankis ĉe fako de pentristoj „senmanaj“ (kiuj pentris per buŝo aŭ piedo!).

La ekspozicion vizitis kun intereso multaj urbanoj kaj gastoj de Ruse.

Ankaŭ kelkpersona grupo el E-Societo „Libero“ vizitis la ekspozicion. Ĝi estis afable renkontita de la fervora s-anino Kafegieva, al kiu la grupanoj esprimis sian dankon kaj admiron pri tiu ĉi kultura iniciato, realigita pere de Esperanto.

B. Kavalĝiev

LA MONDO SOIFAS PRI PACO KAJ FELIĈA VIVO

De la 12 ĝis la 19 de novembro 1972 sub tiu ĉi devizo nia E-Societo „Balkana Stelo“ en urbo Trojan aranĝis E-ekspozicion lige kun la 70-a datreveno de la unua kurso de Esperanto en la urbo.

Multaj redakcioj de Esperanto-periodaĵoj helpis nin kaj aperigis nian peton pri alsendo de materialoj. Tiajn materialojn ni ricevis preskaŭ el ĉiu angulo de nia planedo. Samideanoj el Malproksima Oriento (Japanio) kaj Nov-Zelando ĝis la okcidenta bordo de l'amerika kontinento (Vankuver — Kanado, San Francisko — Usono) kaj Buenos-Aires (Argentino) reĉis malavare al nia alvoko. Tio montras, ke la mondo, la ordinaraĵoj homoj de la mondo, soifas pri kompreniĝo kaj amikeco, pri paco kaj feliĉa vivo!

En la ricevitaĵoj materialoj abundis varieco: fotoj kaj vidkartoj pri la naturo kaj ĉiutaga vivo de diversaj landoj, artikoloj el eksterlandaj ĵurnaloj kaj gazetoj rilate al Bulgario, k. a. El USSR ni ricevis kelkajn pretajn bildtabulojn kun diversa enhavo. La ekspozicio konsistis el 38 bildtabuloj, kelkaj ricevitaĵoj el u. Polski Trâmbeŝ. Ĝi estis aranĝita en la antaŭsalono de la nova kinejo „Lenin“ — tio favoris la multnombrian vizitadon.

La urbanoj kun intereso rigardis la elmontraĵojn. Ofte iuj silabumis la titolojn de la periodaĵoj. Multaj estis tre surprizitaj, ke dum sia 85-jara ekzistado Esperanto disvastiĝis tra la tuta planedo, ke ĝi estas uzata en la vivo kaj la scienco, ke ĝi, kvankam nerapide, jam penetras la internaciajn rilatojn kiel vivanta parolata lingvo.

La utileco de similaj ekspozicioj estas granda, ĉar ili rekte popularigas la lingvon en ĉiuj socitavoloj. Ankoraŭ multaj homoj, eĉ alte instruitaj, malmulton aŭ nenion scias pri Esperanto. Malagrable sentas ĉiu esperantisto, kiam li aŭdas, ke tiaj homoj eĉ la nomon

de la lingvo kripligas, dirante „eksperanto“ (kun k). Ĉi tio bone montras, kiom granda kaj grava tasko staras antaŭ ni, kun kia energio kaj persisto devas labori ĉiu esperantisto, ĉiu E-societo, ĉiu DK kaj la tuta BEA.

La ekspozicion vizitis esperantistoj el multaj loĝlokoj de la distrikto. Ĝi estis ankaŭ bona motivo por niaj membroj krei kontaktojn kun samideanoj el multaj landoj de ĉiuj kontinentoj.

Estas utile ĝeneraligi la spertojn de ĉiuj E-societoj, aranĝintaj ekspoziciojn, kiel tiuj de Polski Trâmbeŝ, Drjanovo, Loveĉ, Trojan k. a., kaj aperigi instrukcion pri la aranĝo de ekspozicioj, simila al la artikolo de prof. d-ro Ivo Lapenna en revuo „Esperanto“, n-ro 6/1972 j.

La samideanoj el ĉiuj landoj de la mondo devas respondi ĉiam jese al similaj iniciatoj, sendante variajn materialojn, speciale literaturon. Ĉar la literaturo kaj la gazetaro montras, ĝis kia grado nia lingvo penetris en la praktikon kaj la sciencon. Tio altiras la atenton de la kultura publiko kaj respondecaj agantoj. En similaj aranĝoj oni vaste devas utiligi ankaŭ opiniojn pri Esperanto de elstaraj personoj — verkistoj, poetoj, scienculoj, artistoj kaj sociagantoj pri Esperanto. Tio bone efikas la neesperantistan publikon. La lingvo disvastiĝas multe pli rapide, se na sukcesus penetri en tiujn socitavolojn kaj atingi tiri novajn adeptojn.

Al ĉiu sendaĵo, al ĉiu letero ni respondis siatempe, sendante po unu ekzemplero de la bela turista prospekto „Bulgario“. Lige kun la ekspozicio kaj speciale per la dissenditaj 250 ekz. de tiu ĉi prospekto ni diskonigis la atingojn de socialisma Bulgario tra la tuta planedo. Jam multaj estas la dankleteroj kaj la valoraj eldiroj pri la prospekto kaj nia Patrolando.

Vasil Mitovski



E-RONDO EN BOROVO

En v. Borovo, distrikto de Ruse, funkcias E-rondo en la fundamenta lernejo. Ĝi ekvivis komence de lernojaro 1972/73. En ĝi partoprenas 14 gelnantoj el la 5-a, 6-a kaj 7-a klasoj. La gvidanto estas Ivan Nečev, instruisto en la sama lernejo.

Okaze de la naskiĝtago de Zamenhof la sekretario de E-Societo „Lumo“ Marin Bârdarov vizitis la rondon. Li parolis antaŭ la gelnantoj pri la vivo kaj agado de Zamenhof, montris al ili la libron „Estonio“, salutleterojn de lajpcigaj esperantistoj okaze de la 90-a naskiĝdatreveno de Georgi Dimitrov, senditajn al E-Societo „Lumo“, kaj aliajn librojn kaj leterojn, ricevitaĵojn el eksterlando.

K-do Bârdarov rakontis ankaŭ rememorojn pri siaj vojaĝoj kiel esperantisto al Hungario, Aŭstrio kaj aliaj landoj. Li parolis parte en bulgara lingvo, parte en Esperanto. Ĉiuj aŭskultis lin kun ĝojo kaj granda atento.

Natalija Račeva

NOVAJ ESPERANTO-KURSOJ

Ruse

Komence de lernojaro 1972/73 E-Societo „Libero“ malfermis du kursojn por komencantoj: en la klubejo, gvidatan de diplomita lektoro Ĝančo Canev (12 gekursanoj) kaj en la Junulara Domo, gvidatan de s-anino Maria Petrova (16 gejunuloj).

En la lernejo por profesiaj konstruistoj, laŭ iniciato de ĝia direktoro k-do Stojanov, ekgvidis kurson la lerneja eksinspektoro s-ano Grânčarov (15 gekursanoj).

Laŭ iniciato de la direktoro de la loka Pupteatro k-do Jakov komenciĝis E-kurso por la artista kolektivo, kiu pasintjare partoprenis la 4-an PIF en Zagreb kaj gajnis 3-an premion per „La neĝa reĝino“, fabelo de la fama dana verkisto Andersen.

La Pupteatro estas invitita al Danio, kie ĝi dum turneo prezentos esperantlingve la spektaklon „La neĝa reĝino“ en kelkaj urboj. La kontrakto estas jam subskribita kaj en marto 1973 la teatro forveturos. Ĝis tiam la artistoj, instruataj de la sperta lektoro Stefan Popov, perfektigos sin en la lingvo por ludi siajn rolojn kiel bonaj esperantistoj!

B. Kavalĝiev

Pazarĝik

En la urbo funkcias la jenaj E-kursoj por komencantoj:

por civitanoj — kursgvidanto Ljuba Paševa;
en la projekt-organizaĵo — kursgvidanto Pejo Peev;

en la pupteatro — kursgvidanto Rosica Georgieva.

Por la malnovaj esperantistoj funkcias parolanta rondo.

R. Georgieva

GAJA EKSURSO

Pri tiu ĉi ekskurso ni jam tutan semajnon parolis.

Do, la sabato venis, kaj ĉiuj estis je la fiksita horo antaŭ la junulara domo. La aŭtobuso ekveturis al urbo Marica. Kantoj, ŝercoj kaj gajo plenigis ĝin.

La samideanoj de Marica renkontis nin afable: komenciĝis koraj amikaj interparoloj. K-do Kurtev — prezidanto de la E-societo en Marica — rakontis pri la vivo de la esperantistoj en la urbo, pri sia vivo kiel esperantisto, pri sia E-korespondado.

Poste, kune kun gejunuloj-esperantistoj el Marica, ni daŭrigis nian vojon al la turista domo „Zornica“, proksime de Marica. En tiu ĉi trankvila loko ni trovis multan sinceran varmecon kaj agrablan ripozon. Ĝis malfrue post la noktomezo la turista domo estis plenkuna de niaj kantoj, dancoj, gajaj amuzoj.

Ekstere estis malvarme, pluvo kaj g acifrosta vento, sed tio ne malhelpis nian bonan humoron. La varmon, kiun ni ricevis el ĉiuj 22 koroj, ni longe gardos kaj la ĉarmegajn horojn en la turista domo „Zornica“ ni neniam forgesos.

Antonia Spasova

CELEBRO DE ZAMENHOF-NASKIĜTAGO

Honore al la 113-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof la membroj de E-Societo „Progreso“ ĉe la Uzino de Ŝarĝaŭtomobiloj „Madara“ en Ŝumen aranĝis solenaĵon. Ĝi estis malfermita de recitalo „Perloj el la poezio de Zamenhof“ fare de la societaj membroj Zorka Jankova, Jordan Sterev, inĝ. Janka Dimitrova, Evtimija Spirova, Milka Petkova, Rajna Stančeva.

Pri la vivo kaj afero de Zamenhof parolis k-do Canko Murgin.

Estis prezentita riĉa Esperanta belarta programo. La kunesto kontinuus en la junulara dolĉaĵejo ĉe la uzino. Post tio ĉiuj esperantistoj grupe revenis en la urbon, kontentaj, en bonega E-humoro.

Rajna Stančeva



TRA LA E★ MONDO

NOVA SUKCESO „JUNA AMIKO“

Internacia Lerneja Esperanto-Re- vuo

Post plurjara penado de dekoj da sper-
taj esperantistoj el la tuta mondo, fine
aperis altkvalita revuo, inda je internacia
populareco inter ĉiuj esperantistoj. La re-
vuo celas precipe la lernejanon, sed ĝi
certe altiros multajn ekster-lernejajn sa-
mideanojn.

„JUNA AMIKO“ estas ideala legaĵo por
komencantoj. Simpla lingvaĵo, amuza, tre
varia enhavo kaj formo igas ĝin alloga
periodaĵo en Esperantujo. Ne nur la ti-
tolo fanfaronas per la epiteto „internacia“,
sed efektive la redakcion formas 24 per-
sonoj el 18 landoj. Tio estas reala garan-
tio por vera internacieco.

„JUNA AMIKO“ ampleksas 24 du-kolore
presitajn paĝojn en formato 19×14,5 cm,
kaj estas ilustrita 50-procente.

La internacian lernejan Esperanto-re-
vuon eldonas la Hungara Esperanto-Aso-
cio, kaj estas aĉetebla ĉe la landaj Espe-
ranto-asocioj.

Se vi volas akiri por vi kaj viaj kurs-
anoj utilan esperantaĵon, senhezite men-
du ĝin ĉe Bulgara Esperantista Asocio.
Persone konvinkigu pri la utilo de tiu ĉi
unika iniciato!

„INFORMILO“

de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, n-ro 34/1972

La tuta numero estas plena je materialoj,
ligitaj kun la vizito en Bulgario de la oficialaj
reprezentantoj de VPEA, la vjetnamaj poetoj
Dao Anh Kha — ĝenerala sekretario de VPEA,
kaj Nguyen Hai Trung — komitatano de VPEA,
lige kun la 38-a Kongreso de Bulgara E-Asocio.
En la enkonduka artikolo sub titolo „Amikecaj
mesaĝistoj al la lando de rozoj“ oni diras:

„Tio estis feliĉega okazo por ili (por la du
reprezentantoj — *noto de Red*) persone kon-
stati la korvarmecon kaj profundecon de la
sentoj prodigataj de la bulgaraj popolanoj kaj

esperantistoj favore al la frata vjetnama popolo,
kiu ankoraŭ batalas kontraŭ la komuna mal-
amiko por siaj sendependeco, libero kaj por
socialismo, mondpaco. Ankaŭ propraokule ili
vidis kaj admiris la preskaŭ fabelajn paŝojn
antaŭen en la socialisma konstruado fare de
la frata bulgara popolo, kiu kreis al si jam
feliĉan vivon kaj krome scipovis starigi al si
bele tradician, riĉforman kulturon kaj alt-nivele
revolucion moralon, el kiu fontis ĉiu nobla
kaj sindonema gesto favore al la vjetnama
justa kaŭzo.

Ne estas hazarde, ke la dusemajna vizito
al la „lando de rozoj kaj de koroj“ multe
impresis ambaŭ delegitojn-poetojn.“

En la „Informilo“ estas plene donitaj: la
saluttelegramo de la 38-a Kongreso de BEA
al VPEA, la saluttelegramo de la porpaca
mitingo en Smoljan al la batalanta vjetnama
popolo kaj la protesta telegramo de la
sama mitingo kontraŭ la prezidento de Usono
Nixon; la salutparolado de k-do Dao Anh
Kha al la 38-a Kongreso de BEA, la paro-
lado de k-do Nguyen Hai Trung antaŭ la
mitingo en Smoljan kaj la parolado de Dao
Anh Kha antaŭ la publika kunveno en urbo
Targovište.

Fine estas donita Deklaro de la Moskva In-
ternacia E-Klubo sub titolo „Manojn for de
Vjetnamio!“

K. V.

PATROLKONKURSO 1972

Kiel nia organo jam informis (n-ro 5/1972),
la Itala Literatura Rondo „La Patrolo“ duafoje
en la pasinta jaro organizis internacian litera-
turan konkurson sub la nomo „Patrolkonkurso
1972“. Partoprenis ĝin 28 konkursaĵoj, nome
22 geverkistoj el 10 landoj. La organizantoj
speciale notas, ke „rimarkinda estis la granda
partopreno de bulgaroj“.

La ĵurioj aljuĝis la jenajn premiojn:

Originala poezio:

I premio: „Mi mem“ de G. L. Gimelli (italo);

II premio: „Floroj apud abismo“ de Kjelli
Walraamoen (norvego);

III premioj: „Consecutio temporis“ de Julius
Balbin (usonano);

„Dialogo inter infanoj kaj lacertego“ de
Adriana Ravoni (italino).

Originala prozo:

I premio: Ne aljuĝita;

II premio: „Kio estas lumo“ de Nevena Ne-
delčeva (bulgarino);

III premio: „Unua kortremo“ de Penka Ba-
toeva (bulgarino);

Laŭda mencio: „Dancado sur placo“ de Lina
Gabrieli (italino).

La gajnintoj ricevis diplomojn kaj monpre-
miojn. La premiitaj verkoj aperos en la gazetoj
„Literatura Foiro“ kaj „L'Esperantisto“.



La angla dusemajna revuo „Comment“, organo de la Komunista Partio en Anglio, en sia n-ro de la 10 de novembro 1972 aperigis grandan materialon de Bill Keable pri la Esperanto-movado.

Tuŝinte la agadon de la Brita Laborista E-Asocio antaŭ la milito, kiam oni subtenis utilajn kontaktojn kun sovetaj laboristoj pere de Esperanto, la batalon de la progresema Esperantistoj kontraŭ faŝismo kaj la malfacilojn de la E-movado tuj post la Dua Mondmilito, la aŭtoro plue skribas:

„Ĉi-jare (1972 — noto de Red.) mi havis la feliĉon ricevi personan inviton de CK de Bulgara Esperantista Asocio por ĝia 38-a nacia kongreso. Ĝin partoprenis pli ol 1000 delegitoj. La kunsidoj okazis en Esperanto. De la tribuno parolis reprezentantoj de frataj delegitaroj el Sovetunio, GDR, DR Vjetnamio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, ankaŭ persone invititaj kamaradoj el Francio kaj Nederlando, inter kiuj estis ankaŭ mi, el Anglujo.

Tio estis aktiva kongreso, dum kiu la delegitoj vigle diskutis. Estis ankaŭ belarta lite-

ratura-muzika programo, amuzoj, ekskursoj ktp.

Por mi estis agrable renkonti kun kamaradoj, kun kiuj mi laboris antaŭ 30 jaroj, kaj eltiri el la partiaj arkivoj fotokopiojn de tradukitaj materialoj, senditaj tiutempe de ni kaj aperigitaj en la bulgara Esperanto-gazetaro.

En Bulgario mi vidis veran, revolucian, socialistan E-movadon, kreitan delonge. Multaj elstaraj sociagantoj de hodiaŭa Bulgario, inter kiuj ankaŭ partimembroj kaj ŝtatagantoj, lernis la lingvon ĉu antaŭ la faŝista puĉo de 1923 j., ĉu post tio en la malliberejo.

Georgi Dimitrov ĉiam estis amiko de Esperanto. En la malfacila komenca periodo de Popola Respubliko Bulgario li persone helpis la esperantistojn havigi al si paperon kaj ke oni faru al ili faciligojn en la presejoj.

Nedelonge BEA estis honorita per ordeno „Kiril kaj Metodi“ — la plej alta bulgara ordeno por elstara agado sur la kampo de la kulturo.

Fine la aŭtoro diras, ke la anglaj esperantistoj povas lerni el la ekzemplo de la bulgara E-movado por plivigli sian agadon.

El la angla: M. Mindov

El la Esperantaj leteroj

Palanga, 1 de aŭgusto 1972

Tre estimata kamarado kaj amiko Popov!

Mi dankas vin pro la sendita libro „Bulgara prozo“. Mi kunprenis ĝin al la ripozejo por legi, kiam pluvos, kaj ni devas sidi en la ĉambro. Mi jam tralegis la libron kaj estas tre kontenta pri ĝia enhavo. Precipe plaĉis al mi la lasta rakonto pri la bulgara majoro Ivan Rankov, kiu havis du kokojn, nomitajn Penlevé kaj Lojlorj. La kuiristo hazarde mortbatis Penlevé kaj estis severe punita de la kruela majoro. Do, estis tiaj tempoj, kiam la regimentestroj pli ŝatis kokojn ol siajn soldatojn. Ni povas ĝoji, ke tio jam forpasis, kaj ke la majoro estis punita pro siaj kontraŭmoralaj agoj.

Interesaj estas ankaŭ la rakontoj pri la fondiĝo de kolektivaj mastrumoj en Bulgario, ekz. „Novaj vojoj“ aŭ „Viŝo rigardas en la estontecon“. Malfacilaj estis la unuaj paŝoj, multajn suferojn kaŭzis tiu transformiĝo de mastrumaj rilatoj, ne ĉiuj komprenis, ke la kooperativa kamparmastrumo estas pli bona ol la individua. Kaj nun jam ĉiuj alkutimiĝis al la nova socia ordo kaj ne plu deziras revenon al antaŭaj formoj de mastrumado. Kiel ĉe ni, tiel ankaŭ ĉe vi. La homaro progresas, tamen ne rekte, sed zigzage. La historio estas komplikita, ofte okazas ankaŭ returnaj paŝoj.

Dank' al via zorgo mi ricevis ĉi-jare 3 numerojn de „Bulgara Esperantisto“. Tre interesa vevuo, pli bona ol multaj aliaj, kiujn mi ankaŭ legas. Tre ĝojigaj por ni estas la artikoloj pri la Esperanto-movado en Litovio, publikigitaj en „Bulgara Esperantisto“. El tiuj raportoj evidentiĝas, ke la bulgaraj esperantistoj simpatias la litovajn esperantistojn kaj ĝojas pri iliaj progresoj.

Ĉi-jare ni havis du Esperanto-kunvenojn en Litovio — la 1-an de julio en Dotnuva kaj la 7—9-an de julio en Giruliai (Klajpeda regiono). Ambaŭ ilin mi partoprenis. La unua (en Dotnuva) estis dediĉita al la 50-jara jubileo post la fondo de E-rondeto, nomita „Verda Kverko“, en Litova Terkultura Akademio. Partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj. Organizis tiun rondeton la termezuristo L. Alseika, aktiva gvidanto estis ankaŭ la profesoro de agrokemio V. Ruokis (ambaŭ jam forpasintoj). La fondiĝoj plantis memore en la akademia parko kverkon, kiu ĝis nun bone kreskas kaj estas ĉirkaŭ 20 m alta.

La dua renkontiĝo de litovaj esperantistoj similis al tendaro. Partoprenis ĝin 102 personoj. Estis starigitaj 21 tendoj. La kunveno okazis en parko sub lazura ĉielo. Oni aŭskultis du prelegojn pri eminentaj personoj. K-do Vaitekunas prelegis pri Liudas Alseika, esperantisto-veterano, kaj mi raportis pri la unua litova botanikisto Jurgis Pabriža (1771—1849), kiu esploris la litovan flaŭron en la okcidentaj regionoj de la lando kaj verkis en gepatra

A. Konstato. Kiam oni legas atente, kvazaŭ per okuloj de novulo, la diversajn Esperanto-eldonaĵojn, aperintajn en la lastaj dudek jaroj, oni faras la jenan pripensigan konstaton: la Internacia Lingvo kreske pliriĉiĝas kaj pliampleksiĝas; sed samtempe ĝi fariĝas pli kaj pli komplika kaj malfacila.

Tiu evoluo minacas la disvastigon de Esperanto en malaltaj kaj mezaj socitavoloj ĉiulandaj. Estas sendube, ke ĉiuj lernantoj, ĉiuj novaj — kaj miloj da malnovaj — adeptoj de nia lingvo aspiras legi tekstojn en Esperanto simpla kaj facila. Bedaŭrinde, ne aperas sufiĉe da eldonaĵoj, kiuj kontentigas tiun postulon plene kaj ĉiurilate. Altrudiĝas la impresoj, ke certaj aŭtoroj kaj redaktoroj sidas en „ebura turo“ kaj verkadas nur por si mem, pro privata plezuro, pro intelekta ĝuo aŭ pro literatura ambicio. Ŝajnas, ke ili tute ne pensas pri la kompatinduloj, kiuj legos iliajn produktojn, nek pri la esenca celo de nia lingvo: ebligi al multmilionoj da homoj ne super-instruitaj facile interkompreniĝi en la tuta mondo. Ĉu estas mirige en tiuj cirkonstancoj, ke amaso da kursanoj kaj memlernantoj baldaŭ perdas siajn iluziojn pri la onidira facileco de Esperanto? Ĉu estas mirige, ke, pro la sama kialo, multaj novaj (kaj ankaŭ malnovaj) membroj iom-post-iom seninteresiĝas pri nia afero kaj forlasas nian Movadon?

lingvo kelkajn sciencajn verkojn, ekz. „Taislius auguminis“ (Sistemo de la plantoj), latina-litovan botanikan vortaron k. a. Krom tio en la tagordo estis libera tribunio, E-kantoj, deklamado, ludoj ĉe lignofajro k. a. Dum libera tempo la kunvenintoj sunbanis sin sur la strando de la maro. La renkontiĝon partoprenis gastoj el Leningrado, Ĥarkov, Riga, Liepaja, Kaliningrad kaj Tallinn.

Saluton al vi kaj la aliaj bulgaraj esperantistoj.

Jonas Dagys

B. Rimedo. Estas nepre necese ŝanĝi tiun alarman situacion radikale kaj definitive. Por atingi tiun rezultaton, ĉiu celkonscia Esperanto-uzanto devos libervole adopti la jenan sindevigon: *Skribante aŭ prelegante, mi ĉiam klopodos respekti, kiel eble plej strikte la „bazajn kriteriojn“ de Esperanto laŭeble simpla.* Tiuj kriterioj estas formuleblaj jene:

1. Uzi lingvo-stilon malkomplikan kun frazoj kiel eble plej mallongaj; longegaj frazoj enuigas, tedas kaj fortimigas. (Konsultu la modelan gvidilon por akiri bonan Esperanto-stilon: „Ne tiel, sed tiel ĉi!“ de F. Faulhaber!);

2. Uzi prefere vortojn kutimajn kaj dir-manierojn familiarajn, kiajn oni bezonas en la ĉiutaga vivo;

3. Eviti, en ne-fakaj tekstoj, neologismojn kaj maloftajn fakterminojn; ekz. oni prefere uzu „ter-tremo“ anst. „sismo“, „pulmoinflamo“ anst. „pneŭmonio“, k. s.;

4. Uzi participojn nur tiam, kiam estas nepre necese; ekz., skribu „Oni konstruis la domon en 1760“, anst. „La domo estas konstruita en 1760“;

5. Eviti malklarajn aŭ pezajn vortkunmetojn (ekz. pagadmono, provovojaĝoj, pasaĝerelirejo, malvarmummalsanoj); uzu prefere esprimojn tuj kompreneblajn, ekz. „desegnaĵoj pri infanoj“, „desegnaĵoj por infanoj“, „desegnaĵoj de (t. e. apartenantaj al) infanoj“ respektive „desegnaĵoj fare de (t. e. faritaj de) infanoj“, anstataŭ „infan-desegnaĵoj“;

6. Uzi divid-strekon en du-radikaj kaj pli-ol-du-radikaj vortkunmetoj, por ke ili estu pli facile ekkoneblaj. (Vidu en Plena Gramatiko 1938, § 411!);

7. Eviti laŭeble la elizion de la finaĵo -o en vortkunmetoj. Tiu regulo senteble plifaciligas la prononcon en multaj kazoj; ekz. fiŝo-supoj anst. fiŝsupoj; mento-teo anst. mentteo k. s. Krome, ĝi ebligas ĝuste aŭdigi la ĉef- kaj

flank-akcenton, ekzemple sunovarmo (ne sunvarmo kiel ĝendarmo). (Vidu P.G. § 4 kaj 5!);

8. Ĝuste uzi la divid-strekon ĉe liniofino (por transporti parton de vorto, pro loko-manko, en la sekvantan linion), dividante la vort-kunmetojn laŭ iliaj partoj gramatikaj; ekzemple ridinda (ne ridi-nda!), pasport-oficejo (ne pasporto-ficejo!); (Vidu P. G. § 412);

9. Uzi la akuzativon nur tiam, kiam ĝi estas nepre necesa, t. e. en rektaj objektoj, kaj por indiki direkton. Tio inkluzivas eviti ne-necesan anstataŭigon de certaj prepozicioj per akuzativo; estas preferinde skribi „memoru pri tio!“ anst. „memoru tion!“, aŭ „restu dum du tagoj“ anst. „restu du tagojn“ k. s.

10. Uzi malavare interpunkciajn signojn por montri, kie la legantoj aŭ prelegantoj iomete haltu, por fari mallongan „spiro-paŭzon“. Abunda interpunkcio konsiderinde faciligas al novuloj klare distingi la frazo-partojn; same ĝi plifaciligas al aŭskultantoj kompreni la sencon de frazoj parolataj. (Komparu, ekz., la du frazojn samvortajn, sed malsam-sencajn: „La knabo petis ĉokoladon, manĝante pecon da pano“ kaj „La knabo petis ĉokoladon manĝante, pecon da pano“. (Vidu P.G. § 403!)).

Al tiuj dek „bazaj kriterioj“ jam formulitaj aliloke („Esperanto“ n-ro 761, p. 116), oni povas aldoni ankoraŭ du:

11. Adopti, en propozicioj, la naturan sinsekvon „subjekto — verbo — ob-

jekto“, ekz. „La tigro mordis la krokodilon“;

12. Eviti laŭeble la substantivon de verboj por esprimi agon, ekz. oni skribu „Ni laboras por plenumi la taskon“ anst. „Ni laboras je la plenumo de la tasko“.

C. Realigo. Se estas ne tre malfacile adopti la ĉi supran principon, eble estas malpli facile respekti ĝin seninterrompe kaj strikt-maniere. Tial oni kontrolu siajn manuskriptojn plurfoje kaj sufiĉe rigore. Krome, estas rekomendinde kontroligi ilin, antaŭ publikigo, fare de almenaŭ unu spertulo.

La subskribinto sugestas krei landajn lingvo-komitatojn (LLK), kies bonvolaj membroj kontrolu manuskriptojn tiucele alsenditajn. (Interesuloj povas skribi al mia adreso: 24 av. de Riedisheim, F-68, Mulhouse, Francio).

Samcele estus dezirinde restarigi la faman Internacian Lingvo-Komitaton (ILK) sub la aŭspicio de la Akademio de Esperanto.

D. Fin-parolo. Eble iuj legantoj opinios, ke la skribinto de ĉi tiuj linioj estas tro postulema. Por konvinki ilin, ke oni ne povas esti tro postulema en tiu rilato, mi oportune rememorigu al ili la gravan averton de d-ro Zamenhof, forgesitan de multaj nuntempuloj:

„Ni povos venki nur, se ni zorgeme konservos al nia lingvo ĝian simplecon kaj facilecon.“ (Vidu: P. V. p. 333, kol. 2, l. 10!).

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ laŭprincipe plene dividas la starpunkton de s-ano Albert Lienhardt el la supra artikolo — batali por Esperanto „laŭeble simpla kaj facile komprenebla“. Rilate kelkajn punktojn ni tamen havas rezervojn. Ni invitas ankaŭ aliajn samideanojn eldiri sian opinion pri la starigita demando, farante konkretajn notojn lige kun la 12 punktoj de la aŭtoro kaj ĝenerale pri la problemo de Esperanto simpla kaj facila. Interesajn demandojn, opiniojn, pritaŭzojn kaj rekomendojn ni plezure publikigos en la rubriko „Lingvaj demandoj“ de nia revuo.

Internacia jaro de la libro

Ĉiun sekundon, kiu preterflugas, la presiloj en la mondo produktas 260 librojn kaj 450 ĵurnalojn; ĉiun minuton oni eldonas unu libron tute novan. Pli ol 500 000 titoloj en 8 milionoj da ekzempleroj estas eldonataj ĉiun jaron. Metitaj flankon ĉe flanko kaj kovrilon ĉe

kovrilo, la libroj eldonitaj dum unu jaro farus por la mondo trioblan zonon!

Ĉiun minuton oni presas en Sovetunio ĉirkaŭ 3000 librojn. Fakte en tiu lando oni eldonas librojn en 145 lingvojn: 89 parolataj en la lando kaj 56 lingvoj eksterlandaj. (*Informations Unesco kaj Informa Servo de UEA*).

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

LA ZIZELO, KIU VOLIS SIMILI AL HOMO

de Emma Moškova

Iam vivis zizelo, kiu tre volis esti simila al homo. Li vestis pantalonon kaj demandis:

— Ĉu mi similas al homo?

— Hm, — diris la homo, — vi similas al zizelo, kiu vestis pantalonon.

La zizelo vestis ankoraŭ ĉemizon kaj demandis:

— Nu, ĉu mi nun similas al homo?

— Hm, hm, — diris la homo, — vi nun similas al zizelo, kiu vestis pantalonon kaj ĉemizon.

— Ha, — ekkriis la zizelo, — mi forgesis vesti jakon.

Kaj surmetis jakon.

— Jen, nun mi jam similas al homo, — diris la zizelo.

— He-e-e, zizelo, — mediteme diris la homo, — vi ankoraŭ ne similas al homo.

La zizelo frapis sin forte en la brusto kaj post sama frapo sur la kapo eksaltis kaj ekkriis:

— Mi scias! Mi scias! Mi komprenis, kio necesas por iĝi homo, kio mankas al mi por iĝi homo!

Kaj la zizelo akiris ankoraŭ okulvitrojn kaj ĉapelon, kaj kravateton.

— Nu, nun ja mi estas homo, — grave diris ĝi kaj ekpaŝis al siaj aferoj — top, top, top.

Sed kiam ĝi revenis — ŝlop, ŝlop, ŝlop — sur ĝi estis nek la jakon, nek la pantalonon, nek la ĉapelon, nek la kravateton, nek la okulvitrojn.

— Kio okazis al vi? — demandis la homo.

— Al mi? — demandis la zizelo.

— Jes, kio okazis al vi? — redemandis la homo.

— Tio ĉi okazis ne al mi, — diris la zizelo, — tio ĉi okazis al la katido, kiu sidis en la putro.

— Kiel ja katido troviĝis en la putro? — demandis la homo.

— Kiel ĝi tien trafis, mi ne scias. Mi scias nur, ke ĝi tie troviĝis. Kaj ploris ĝi, tre laŭte ploris. Certe ĝi timis, estante en tiu terura putro, en tiu malvarma putro. Sed forestis ŝnuro, nek unu ŝnuro estis, neniu ŝnuro estis... Bone, ke mi havis pantalonon kaj jakon, kaj ĉemizon, ĉar estis necese urĝe fari ŝnuron, — rapide rakontis la zizelo.

— Kaj vi faris ŝnuron? — demandis la homo.

— Jes, mi faris ŝnuron. Sed nun... Nun mi per nenio similas al homo — nek per pantalonon, nek per ĉemizon. Jes... Mi komprenas. Krome ja mi fallasis la okulvitrojn. Kiam mi tiris la katidon, mi fallasis en la putron ankaŭ la ĉapelon... Jes, vidu: nun mi per nenio similas al homo, — plende diris la zizelo.

— Ho, — diris la homo, rigardante ne al la zizelo, sed al la ĉielo. — Ho, kiel vi similas! Kiel vi similas al homo! Nun vi tre similas al homo!

*El la rusa: Boris Anohin
Ustj-Kamenogorsk — USSR*

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „Pravna Tribuna“ (17. VIII. 1972), semajna eldonaĵo de la sofiaj juristoj: raporto pri la 38-a Kongreso de Bulgara E-Asocio.

En la sama ĵurnalo: fragmentoj el „La genocido“ de prof. d-ro Ivo Lapenna (en kelkaj n-roj) kun indiko, ke ĝi estas traduko el Esperanto kaj la aŭtoro estas elstara figuro de la tutmonda E-movado kaj prezidanto de UEA.

En ĵ. „Rabotničesko Delo“ — organo de la CK de Bulgara Komunista Partio (3. IX. 1972) en la materialo „Sur la barikadoj“ la elstara nuntempa poeto Veselin Andreev mencias pri Esperanto en la jaroj de la kontraŭfaŝista batalo.

En la sama ĵurnalo (9. X. 1972): informo „Utilplena agado“ — pri la varia agado de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en u. Vraca.

En la sama ĵurnalo (31. X. 1972) — informo



pri la plenkunsido de CK de BEA, okazinta la 30-an de oktobro.

En la sama ĵurnalo (6. XI. 1972) — artikolo de la historiisto Nikolaj Belusov pri Nikola Ŝopov — elstara esperantisto, pereinta en la kontraŭfaŝista batalo.

En la sama ĵurnalo, n-roj 330 kaj 331 de 25 kaj 26 de novembro 1972 — vojaĝnotoj „Gaste en Uzbekistano“ de Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM kaj de BEA.

En ĵ. „Zavoiŝko Delo“, eldonata en la uzino „Balkan“ en u. Loveĉ (25. IX. 1972) — informo de Kina Atanasova pri la partopreno de la uzinaj esperantistoj en la 38-a Kongreso de BEA.

En la junulara revuo „Kartinna Galerija“, eldonata en bulgara kaj rusa lingvoj en pli ol 100 000 ekz. (septembro 1972) — artikovo „Esperanto — la plej facila fremda lingvo“ de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA kaj MEM.

En la semajna ĵurnalo „Anteni“ (6. X. 1972) — grava priesperanta art kolo „Lingvistiko kaj interlingvistiko“ de la sovetia akademiano d-ro P. S. Ariste. Tradukis el la sovetia junulara ĵurnalo „Komsomolskaja Pravda“ Petko Arnaudov el Pazarĝik.

En la sama ĵurnalo (10. XI. 1972) — artikolo de la publicisto Nedelĉo Ganĉovski pri Nikola Ŝopov.

En ĵ. „Ĥaskovska Tribuna“ (12. X. 1972) — raportaĵo „Distrikta renkontiĝo de esperantistoj“ de Ĵeko Zaprianov — pri renkontiĝo de esperantistoj el la distrikto de Ĥaskovo apud la fama „Fonto de la Blankpiedulino“ dediĉe al la 50-jara jubileo de USSR.

En ĵ. „Uĉitelsko Delo“, organo de la Instruista Profesia Unuiĝo kaj de la Ministerio de la Popola Instruado (17. X. 1972) — alvoko de la instruistoj-esperantistoj pri lernado de Esperanto (la sama alvoko aperis en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 9, p. 1).

En la sama ĵurnalo (28. XI. 1972) — informo de I. Borisov pri la agado de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en u. Vraca.

En ĵ. „Eho“, organo de Bulgara Turista Unuiĝo (13. X. 1972) — granda raportaĵo „Al la Turista Renkontiĝo-Festivalo en u. Szeged, Hungario“.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (20. X. 1972) — skizo pri esperantisto-aktivulo Bojĉo Mladenov — instruisto en gimnazio „Ĥristo Botev“, gvidanto de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en Vraca.

En la sama ĵurnalo (27. X. 1972) — informo pri la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en u. Vraca. En la sama n-ro: „Ili arde lernas Esperanton“ de Anĉo Anĉev — pri E-kurso en u. Mezdra.

En ĵ. „Septemvriŝko Zname“ — Kneĵa (24. X. 1972) — informo pri la nacia foresta porinstruista E-kurso de Boris Gorniŝki.

En ĵ. „Ŝumenska Zarja“ (31. X. 1972) — informo „Fruktodona agado“ de Cvjatko Todorov pri la agado de la esperantistoj honore al la 50-jara jubileo de USSR.

En ĵ. „Narodno Delo“ — Varna (1. XI. 1972) — informo pri komenco de E-kurso, organizita de la loka E-Societo „Albatro“.

En la sama gazeto (30. XI. 1972) — informo pri E-kurso por juĝistoj kaj oficistoj en la Distrikta Juĝejo en u. Varna.

En ĵ. „Veĉerni Novini“ (10. XI. 1972) — informo „Sukcesoj de la Ŝtata Pupteatro de Burgas“ de D. Bâĉvarov — pri la partopreno de la Pupteatro de Burgas en la V-a Pupteatra Internacia Festivalo Esperanta en u. Zagreb, Jugoslavio.

En ĵ. „Oteĉestven Front“ (28. XI. 1972) — informo pri komenciĝonta perinstruista E-kurso en Sofio.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Veneta Ĉukova — str. Stara Planina № 3, vh. A, *Drjanovo* (pm, intereso pri reciprokaj gastadoj).

Jonka Nikoevska — str. Bratja Denĉevi 54, *Drjanovo* (emerita instruistino — kun ĉl).

Geno Stojanov Manev — str. 12 juni 7, *Drjanovo* (kun ĉl — pri geografio, E-movado k. a.)

14 junaj geesperantistoj — lernantoj (13—15-jaraj) dez. korespondi kun ĝelernantoj el la tuta mondo. Ili interesiĝas pri bk., pm, insignoj k. a. Skribu al ilia instruisto: Ivan Neĉev (por la Esperanto-rondo), s. *Borovo*, okr. *Rusenski* (vd p. 11).

Kubo

Felipe Felipe — Calle 23/1613 apt. 31. e/28 y 30 Vedado, *Habana* 4 (23-j. — kun ĉl pri revuoj, muzikaĵoj, sondiskoj, pm k. a.)

Prof. Mose Asis — Rabi/655, *Habana* 5 (kun gebulgaroj).

Pollando

Amiela Szymanska — *Bydgoszcz*, ul. Nakielska 201 (41-j. — pri libroj, kino, libertempo).

Rumanio

Kustan Laszlo — *Sf. Gheorghe*, str. Ciucului 48, jud. Covasna (23-j. inĝeniero — kun ĉl pri artoj, turismo, pm, bk).

Redakta komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV, Stefka ĤRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82



ŜTATA EKONOMIA ENTREPRENO „BALKANTURIST“
PROPONAS AL VI AGRABLAN KAJ VARIAN RIPOZON ĈE MARO
DUM ĈIUJ SEZONOJ DE LA JARO —
DO, ANKAŬ AŬTUNE, VINTRE KAJ PRINTEMPE.

La intensa sunradiado, la riĉa jonizado kaj la kloraj, jodaj kaj bromaj haladzoj en la aero, la manko de malvarma vento kaj nebuloj, la malgrandaj pluvkvantoj, la temperaturo de la mara akvo

ESTAS PREMISOJ POR PLENVALORA RIPOZO.
JE VIA DISPONO ESTAS LUKSAJ HOTELOJ, UNUAGRADAJ
RESTORACIOJ KAJ ORIGINALAJ RESTORACIOJ EN POPOLA STILO:

Ĉe „Zlatni Pjasaci“ (Oraj Strandoj)

hotelrestoracioj „Internacional“, „Ambasador“ kaj „Ŝipka“, restoracioj en popola stilo „Vodenicata“ (La Muelejo), „Koŝarata“ (La Ŝafejo), „Lovna Sreŝta“ (Renkontejo de Ĉasistoj)

Ĉe „Družba“ (Amikeco)

*hotelrestoracio „Riviero“,
trinkejo „Ĉernomorec“, restoracio en popola stilo „Manastirska Izba“ (Monaĥeja Kelo)*

Ĉe „Slânĉev Brjag“ (Suna Bordo)

*hotelrestoracioj „Kuban“, „Burgas“, „Diamant“,
restoracio „Palma“, popolstila restoracio „Ĉučura“*

**EN ILI VI TROVOS AKURATAN PRISERVON, AGRABLAN KAJ INTIMAN
ATMOSFERON.**

**AŬTUNE, VINTRE KAJ PRINTEMPE LA PREZOJ EN LA
BULGARA NIGRAMARA REGIONO ESTAS REDUKTITAJ!**

Informoj kaj rezervado:

*por eksterlando: la reprezentantoj de la Komitato de Turismo
por Bulgario: la oficejoj de „Balkanturist“.*

